ISSN 1886-1997

La 34ª jaro

# Kajeroj el la Sudo

Bulteno de la Hispana Asocio de Laboristoj Esperantistaj

http://www.gazetoteko.com/kajeroj/k124/k124.html

*Oni plibonigas la mondon pere de sinklerigado*




Artikolo 16. La ideologia, religia kaj adorema liberecoj de individuoj kaj komunumoj estas garantiita sen plia limo, en siaj manifestiĝoj, ol tiu necesa por la konservado de la publika ordo protektita de la leĝo. Neniu povas esti devigita atesti pri sia ideologio, religio aŭ kredoj.

Nº 124ª

Julion 2022

*Kajeroj el la Sudo*

*Bulteno de la Hispana Asocio de Laboristoj Esperantistaj (HALE).*

# Enhavo

**Redaktore**: Kion pri la mondo?....3
**Politiko**:
Favore al Reĝo Johano Karlo...........4
Pri dekstro kaj maldekstro................6
Vi bruliĝos kiel je '36!.......................8
**Socialo**:
Trompo registara.............................13
Elektriko en Hispanio.....................14
**Beletro:**
***Sanigaj murdoj***: Intervalo..............10
***Defendo de Hispaneco***: Dispersio. 16

*Calle Jabonerías, 6.3º D*
*30010 Murcia*
*Hispanio*

ISSN 1886-1938 (printita)

Prezidas: **Johano A. Cabezos.**
Redaktas: **Jesuo de las Heras.**
Korektas: **Jozefo Pina.**
Retskribu al: **kajeroj@gmail.com**

**Pri la enhavo de la artikoloj respondecas ties aŭtoroj, ne la redakcio.**

**Ni ne korespondos pri nepetitaj artikoloj, kvankam ni klopodos publikigi ĉiun artikolon, kiun ni trovos interesa kaj kies enhavo mistraktas neniun personon.**

**Kovrilo**: Maldekstrulinoj interrompis meson en universitata kapelo kriante *Vi brulos same kiel je 1936!* Ni sindemandas ĉu religia libereco ne estas por la religio plejmulta de Hispanio, ankaŭ.



Nesubskribitajn artikolojn verkis la redaktoro.

Pagmaniero: aliĝu al HALE kontraŭ €10 jare por ricevi la surpaperan version de nia magazino.

**Se vi deziras kontibui per aliĝo, kontaktu la redaktoron: kajeroj@gmail.com**

**Oni povas reprodukti la enhavon, kondiĉe, ke oni citu la originon.**

Tute kreita kaj traktita per senpagaj linuksaj rimedoj:
**Scribus**, **Bluefish**, **BlueGriffon**, **Gimp**, kaj **Cyberduck**.

Redaktore

# Kion oni faru pri la mondo?

Iam oni akuzis, ke oni ne parolas tro multe pri socialo, kaj tamen politiko ne mankas en niaj paĝoj. Tamen, ni ĉiuj vivas en mondo, kiu regule ĝiras en la spacon, kvankam ties enloĝantoj stumblas en abismon, progresante kaj regresante laŭ tagoj... Kaj ne ĝenas al nia bonfarto esti avertita pri tio, kio okazas.

Nun kaj en Hispanio kaj en Usono estas memdifinitaj progresismaj registaroj, ili mem diras, ke ili estas maldekstrismaj. Kompreneble, tiu vortumado pri dekstro kaj maldekstro estas relativa, ĉu ne? Relative, mi opinias, al senco mem. Mi memoras, ke oni fiparolis abunde dise tra la mondo pri Prezidinto Trump', pro tio, ke li ne estas politike korekta, sed tamen li finis kvar militojn dum sia regado, kaj neniun li komencis. De la monatoj, kiam la nuna Prezidanto de Usono, Jozefo Biden, finis malkuraĝe kaj tuthonte la militon de Afganio (pro tio, ke li forgesis pri siaj surlokaj aliĝintoj, kiujn li forlasis por ke talibanoj mortigos ilin, se ili mem ne memmortigis por eviti tion), kaj nun kaŝe eniris la militon de Ukrainio kontraŭ Rusio. La malbona novaĵo pri tio estas, ke li lanĉigis €ŭropon en tiun sensencan kaŝan militon, kaj nia registaro hispana estas sufiĉe malhonesta kaj senhonta sekvi tiun movon. Se la tempo de la Imperio de Usono jam finis, kial diable Hispanio apogas la malvenkinton? Ĉu oni jam forgesis ke estis Usono



la lando, kiu forprenis la Imperion Hispanan por starigi pli malhumanan imperion, prifajfante la bonfarton de ties loĝantaroj?

Oni ne scias, ĉu la nova imperio, ĉu rusa, ĉu ĉina estos pli humanisma ol tiu usona, sed mi dubas, ĉu ĉilasta estos tiom humanisma kaj homama kiel tiu hispana, kiun avido por lando kaj riĉeco usonaj forprenis je 1898. Ne mi ploros pro tio, ke Usono devenos en duarangan landon en la konĉerto monda. Dume, la milito plenigas de sango la grejnejon de Eŭropo,

Politiko

# Favore al Reĝo Johano Karlo

ONi atestas neracian kampanjon kontraŭ la reĝo Johano Karlo, en ĝenerala intereso senkreditigi la Monarĥion, sed mi kredas, ke eblas esti samtempe respublikana kaj eleganta. Ni respublikanoj nek estas kontraŭ la monarĥio, nek kontraŭ la reĝo, sed prefere favoraj al la regado de la popolo, kaj sekve de la demokratio, ĉar ĉi tiu lando apartenas al ĉiuj, kaj tial estas oportune, ke ni ĉiuj alprenu niajn politikajn devojn por postuli niajn rajtojn, kaj ne esti nur kontraŭ la reĝo. Ĉar ne temas pri laso de la lando en la manojn de korupta prezidento de la respubliko, (kiel ĉiuj politikistoj, kiuj partoprenis en la nuna politika reĝimo de Hispanio, bazita sur korupto deveninta ne nur de la imuneco de la Reĝo, sed ankaŭ pri la postulata privilegio de miloj da politikistoj ne esti juĝataj de ordinara juĝisto sen permeso de la parlamento, kio provizas al ili imunecon ĝis — post kiam ili ne plu estas deputitoj — ties eblaj krimoj jam kadukis), sed garantii, ke la maljustoj faritaj en la oficejo de reprezentado neniam preskrintiĝas. Kaj ĉar tio



ne eblas en ĉi tiu reĝimo, tial mi diras, ĝi estas korupta pro tio, ke ĝi ne fontas el la popolo de Hispanio.

En la tempo de la aŭstraj reĝoj, kiam alta oficisto forlasis oficejon, li suferis **Rezidejan Proceson**, kaj se li kulpis pri io, li povis iri en malliberejon aŭ pli malbonan lokon. Tio ne plu eblas en la Hispanio de la 21ª jarcento, en kiu altaj politikaj postenoj estas nerespondecaj antaŭ la homoj, kiujn ili juris servi, ĉar tiuj kiuj devus juĝi ilin ne atingis sian oficon elektite de la popolo, sed post sukcesi ekzamenojn aranĝitaj de la koncerna ministerio, tio estas, de politikistoj. Sed

tiuj ekzamenoj —alidirite **konkursoj** — ne devus okazi, sed la postenoj, kiujn ili provizas, estu nomumitaj de balotado, kies rezulton oni povas renversi, se la elektito ne plenumas siajn devojn kaj promesojn. Tiukaze juĝistoj ne respondecas antaŭ la registaro, sed antaŭ la popolo, kaj sekve la procedo estus demokratia.

Sed tio estas sonĝo..., ĉar en Hispanio ne ekzistas demokratio kaj neniam estos. Ne se la politikistojn povas juĝi nur aparta kortumo, kiu bezonas permeson de la parlamento mem por juĝi la kontraŭleĝajn misfarojn de deputitoj. Pro tio en Hispanio oni havas nur miraĝo de demokratio, vera mokado, ĉar la popolo .

Kaj se ne okazos demokratio, la figuro de la Reĝo plifortiĝu, kaj lia pulso ne tremu kiam temas pri eksigi la Registaron aŭ dissolvi la Parlamenton kiam ili ĉesas plenumi sian institucian mision, kion ili ofte faras, malgraŭ la fakto, ke tiu ĉi konstitucio naskiĝis lame kaj maldemokratie. Sed tamen politikistoj malobservas ĝin, kaj nenio okazas al ili. Alilande politikistoj memmortigas pro tio, sed en Hispanio politikistoj ridaĉas al tio.

Pri la Reĝo Emerito oni diras multajn mensogojn, sed neniu kuraĝas diri, ke la Reĝo estas nuda, tio estas, ke ĉi tiu Konstitucio ne estas tia, ke ĝi ne estas demokrata, kaj ke ni hispanoj meritas veran demokration, malgraŭ la jankioj aŭ la nuna politika kasto. La emerito eble ne estis la ideala reĝo, sed nia politika kasto, entute, estis kaj estas multe malpli brila, kaj ties perfidon al ni, la popolo, neniu punas. La popolo ne povas elekti la kandidatojn por deputitaj postenoj, kiuj estas en la listo de iu ajn partio, kaj poste oni cerbolavas nin por ke ni estu tiom senrespondecaj voĉdoni por tiuj, kiujn ni ne konas, kiuj post alveno en oficon, tute ne atentas al siaj promesoj programaj, ĉar ili senhonte laŭtigas tion, ke programojn balotajn oni faras por ne plenumi.

Ĝuste pro tio, **nia civitana devo estas ne voĉdoni.** Ĉar se oni voĉdonas por homo, kiun oni ne konas, oni ne nur estas nerespondeca kaj malprudenta, **sed agas kontraŭ la bonfarto** de nia kuncivitanaro.

Ĉiutage oni aŭdas eĥojn pri tio, ke mono estas lavata en impostaj paradizoj de tiuj, kiuj ili devus procesi ĉi tiujn krimojn. Ĉiutage ni estas punitaj per novaj impostoj por plenigi la poŝojn de la supozataj reprezentantoj de la popolo, kiuj estas nur reprezentantoj de siaj respektivaj partioj, pere de skandalaj salajroj. Kaj se komuna civitano eraras en la impostdeklaro, aŭ sendas ĝin malfrue, oni punas lin aŭ ŝin per severa monpuno.

Nu, estas sufiĉe malsaĝe, ke oni permesu al si daŭrigi tiun reĝimon denaske korupta. Ĉar ni ne iras al armita ribelo, ni ĉiuj fariĝu sindetenantoj: ni petu al niaj proksimulanoj

ne-voĉdoni. Kiam estos balotoj, anstataŭ iri voĉdoni, ni restu hejme, aŭ iru plaĝen, se estas varme. Lasu solaj ĉi tiujn politikistojn, kiuj malestimas nin kaj neniam faros ion por ni aŭ niaj infanoj.

Mi revas, ke iam la hispana popolo vekiĝos el ĉi tiu idiota letargio, kiun ni suferas kiel popolo, kaj kiam ni sukcesos havi vere demokratiajn registaron kaj tribunalojn, ke ĉiujn politikistojn, kiuj pasigis pli ol 40 jarojn, fanfaronante esti demokratoj false, ricevu **Rezidencan Proceson**, por klarigi, ĉu ili agis kontraŭ la intereso de la popolo hispana. Ĉar ĉi tiu popolo iam estis grava, kaj estos grava la tago kiam ĝi denove vekiĝos. Se ne ekzistas demokratio, almenaŭ ekzistu justeco. Kaj justeco ne povas veni de supre, sed de malsupre, de la popolo, kiu subtenas per sia mono kaj vivo la sistemon politikan.

Kaj intertempe, vivu la Reĝo Don Juan Carlos kaj la reĝimo de relativaj liberecoj, kiujn li venigis al ni post la morto de la Diktatoro. **Tamen tiu ne justigu nian nelaboron por venigi la konstitucian Respublikon.**

Politiko

# Pri dekstro kaj maldekstro

Fama filozofo hispana Jozefo Ortega kaj Gasset' iam diris, ke *Aliĝi al maldekstro, same kiel aliĝi al dekstro, estas unu el la senlimaj manieroj homo povas elekti esti stulta: ambaŭ, fakte, estas manieroj de morala hemiplegio*.

De ĉi tiuj paĝoj ni ĉiam defendas, ke oni bezonas kaj dekstron kaj maldekstron por marŝi, ĉar homo, al kiu dekstro aŭ maldekstro mankas, falas. Simile okazas al lando. Sed por tiu oni vere devas havi **maldekstron** kaj dekstron, nome: emo evolui kaj **progresi**, kaj **emo konservi** tion, kio bone funkcias. Evolui per evoluo mem estas tiom sensenca, kiom stagni kaj ne permesi al si evolui.

Bedaŭrinde mankas en Hispanio dekstro kaj maldekstro. Estas partioj, kiuj nomas sin —kaj ankaŭ aliajn— tiel, dekstro kaj maldekstro, sed tamen PSOE kaj PODEMOS ne progresigas la landon, ĉar ni travivas socialan regreson, kun malpli da rajtoj kaj bonfarto, kaj dekstro faras nenion solvi la aferon. En demokratio popolo igus la registaron solvi socialajn kaj naciajn problemojn, sed bedaŭrinde en Hispanio ne ekzistas demokratio.

Sed oni povas klarigi pri nia problemo priskribante tion, kion memdiritaj dekstruloj kaj mal-

dekstruloj diras kaj faras:

Kiam dekstrulo diras, ke li ne ŝatas **pafilojn**, li nur ne aĉetas ilin. Kiam maldekstrulo diras, ke li ne ŝatas pafilojn, li volas malpermesi ilin eĉ en armeo.

Kiam dekstrulo diras, ke li ne ŝatas **taŭroludon**, li ne spektas ĝin kaj fino. Kiam maldekstrulo diras, ke li ne ŝatas taŭroludon, li provas malpermesi ĝin kaj uzas la taŭroludejon por mitingoj de sia partio.

Kiam dekstrulo diras, ke li ne ŝatas **fumi**, li ne fumas kaj fino. Kiam maldekstrulo diras, ke li ne ŝatas fumi, li ne ripozas ĝis li **malebligas**, ke oni fumu.

Kiam dekstrulo estas **samseksemulo**, li vivas sian vivon trankvile ĝenante neniun. Kiam maldekstrulo estas samseksemulo, li fanfaronas pri tio, paradante "orgojle" kaj postulante subvencion publikan.

Kiam dekstrulo havas **problemon en sia laboro**, li trovas alian postenon aliloke kaj fino. Kiam maldekstrulo havas problemon en sia laboro, li **denoncas** laboran persekuton kaj strikas kontraŭ diskriminacio kun apogo de sia sindikato.

Kiam dekstrulo ne **ŝatas televidprogramon**, li ŝanĝas al alia kanalo aŭ malŝaltas la televidilon kaj fino. Kiam maldekstrulo ne ŝatas televidprogramon, li denoncas la kanalon pro tio, ke ĝi estas faŝisma.

Kiam dekstrulo estas **atea**, li ne vizitas preĝejon kaj fino. Kiam maldekstrulo estas atea, li ne toleras aludon al Dio ie ajn publike, kaj protestas kontraŭ religioj kaj ties simboloj (krom kontraŭ Islamismo, ĉar li ne sufiĉe kuraĝas).

Kiam dekstrulo havas **ekonomiajn problemojn**, li laboras plej eble kiel multe, kaj provas pagi siajn ŝuldojn. Kiam maldekstrulo havas ekonomiajn problemojn, li kulpas la registaron —se ĝi ne estas maldekstrisma, kompreneble—, entreprenistojn, burĝistojn, bankojn kaj kapitalismon, globaligon, Usonon, Filipon 2an, Frankon, la Papon, La Reĝa Madrido kaj eksterteranojn...

Kaj tiel plu.

Sed kiam dekstrulo **legas ĉi tiun artikolon**, li ridas kaj mencias al amikoj esperantistaj. Maldekstrulo, tamen, koleras, insultas la redaktoron kaj forĵetas la magazinon.

Ĉu vi leganto, opinias, ke tio estas troigo? Se jes, ni atendas vian opinion por publikigi ĝin en ĉi tiuj paĝoj.

Politiko

# Vi bruliĝos same kiel je '36!

Rita Maestre estas hispana politikistino (oficante nun kiel konsilistino ĉe la urbodomo de Madrido), kiu invadis preĝejon kiam ŝi estis 22jaraĝa, duonnude kaj kriante tiun sensencan sloganon: *Vi brulos same kiel je '36!*

Ŝi apartenas al politika partio *Más Madrid* (Pli da Madrido), kiu estas disiĝo de PODEMOS, tro novaj partioj, kiuj ne scias pri historio, kaj pro tio ili ignoras, ke je la 30aj jaroj de la lasta jarcento maldekstruloj sangavidaj kiel ŝia krio evidentigas, mortigis 3 400 preĝistoj je aŭgusto kaj septembro de 1936 nur pro tio, ke ili estas eklezianoj.

Dum la Dua Respubliko Hispana kaj dum la sekva milito interciviitana brulis multe da preĝejoj katolikaj en Hispanio, kaj ankaŭ oni murdis multe da homoj —ofte post torturado— pro tio, ke ili estis religiemaj, kaj sekve ne revoluciaj. Jen peko antaŭ okuloj de revoluciuloj. Tamen tio ne estas respekto al leĝo aŭ al homaj rajtoj bazaj. Ĉu revoluciuloj atentas al tio? Se ili atentus, ili ne atencus.

Tiutempe religiuloj mastrumis diversajn lernejojn. Sed post bruligi ilin, revoluciuloj ne konstruis novajn lernejojn, kaj sekve infanoj perdis rajton havi edukadonpro revoluciaj kialoj. Jen revolucio kontraŭ la popolo. Ankaŭ ili



Rita Maestre ŝanĝis revolucion al pozado por la revuo *Vanity Fair.*

mortigis instruistojn, se ili estis religiuloj. Tio okazis ankaŭ al monaĥinoj, kiuj instruis en religiaj lernejoj. Tiuj lernejoj, kiuj ne estis bruligitaj, estis fermataj, se ili estis religiaj, kaj sekve la gefiloj de laboristoj ne plu havis kapablon lerni, ĉar lernejbruligistoj ne konstruis novajn lernejojn por la infanoj, kiuj bezonis ilin. Ŝajne, pli bone ne lerni ol lerni tio, kion edukitaj religiuloj povas instrui.

Verŝajne homoj, kiel madrida konsilistino Rita Maestre, sopiras —aŭ almenaŭ sopiris tiutagon— al

tiu etoso, kiam netoleremo al alipensanto estis totalisma fakta normo. Similaj eventoj okazis en Barselono tiutempe, kiuj iris senpunaj. Tamen, en Madrido la afero iris alimaniere, ĉar oni denoncis ilin, kaj fotoj estis prezentataj kiel evidento, kaj okazis kondamna sentenco pro tio, ke ekzistas protekto kontraŭ misrespekto al religiaj sentoj.

Estas ridinde, ke homoj, kiuj defendas tiujn sensencaĵojn, protestas kontraŭ *krimoj pri malamo*, kiu ankaŭ ekzistas en nia jura sistemo, kaj samtempe parolas malame pri katolikoj kaj dekstruloj. Ĉu estas respekto diri, ke **oni brulos same kiel je 1936**? Se tio okazos, estos tempo de milito, malamo, detruo, aferoj, kiujn esperantisto kaj komuna homo kondamnas denaske. Milito kaj malamo pardonas neniun, kaj tion ja scias katolikoj, kiuj suferis kaj ankoraŭ suferas persekutadon ĝismortan de la Romia Imperio ĝis la nuna islamaj landoj. Pro tio Katolikismo estas la religo de amo kaj pardono. Pro tio tiuj *kuraĝaj* maldekstruloj atencas kontraŭ katolikoj kaj ne kontraŭ islamanoj, kiuj ne pardonas ofendon al sia Dio aŭ religio...

En la hodiaŭa mondo, aparte en Hispanio, revolucio havas valoran rolon en la menso de junuloj kaj ankaŭ de maljunuloj, kiuj ne sufiĉe maturiĝis aŭ kleriĝis. Ĉar *revolucio ĉiam voras sian gefilojn,* kiel franca revoluciulo Georgo Jakvo Danton' asertis. Li sciis kial li diris tion: dum la regado de Robespjer' multaj francoj estis mortigiataj, eĉ se ili estis veraj revoluciuloj, eĉ Robespjer' mem estis finfine ekzekutata pere de gilotino. Do, vere estas nenio festumi okaze de la datreveno de la Franca Revolucio. Aliloke tra la maro, en Usono, estis okazinta alia revolucio kaŝe de nomo de sendependiga milito. Ĉar ili neigis la rajton dian de Reĝo de Britio regi ilin, se ili ne estis reprezentataj en la Brita Parlamento. Jen la povo de la popolo: jen la vera revolucio. Kaj ili ne mortigis ilin mem unu la alian, sed batalis milite la *fremdan povon*, la anglojn. Laŭ mi tio ne estis revolucio, sed evoluo.

Pro tio, frazoj tiom sensencaj kiel tiuj de Rita Maestre kaj kunantoj, defiantaj kaj ofendigaj, iras nenien en historio. Malamo konstruas nenion. Amo konstruas ĉion. Sed postulas kuraĝon ami sian najbaron, kiel katolikismo defendas, evidentiĝas malkuraĝon kaŝiĝi en la amaso malami kaj agi, sekve. Mi opinias, ke Rita Maestre havas gravan makulon en sia historio persona, kiu malkapabligas ŝin vivi en politiko. Bonvolu, Rita, rezignu. Vi havas nenion alporti.

Sanigaj krimoj

# Intervalo

La tago estis suna, la temperaturo agrabla, kaj la birdetoj kantis en la branĉoj de la arboj. Brenda akurate alvenis al benko kaj sidiĝis ĉe unu fino.

En la alia fino estas viro kun ĉapelo, kiu legas gazeton kaj de tempo al tempo li voĉigas akran malbenon.

«Ne suferu, sinjoro. Mi esperas, ke ĝi ne estas tiom grava».

«Kio?»

«Vi ĵus diris, *Mi fekas sur vian fikan patrino*n. Mi deduktas, ke tion ne en la mia».

«Ha, saluton, Brenda," mi diris, mildigante mian vizaĝon». «Temas pri la somalanoj. Kiam ili ne ĝenas iujn, ĝenas aliajn, kaj se ne tiujn de transe. Ni kompatindaj!»

«Verŝajne, sinjoro».

«Memoru, Brenda, mi estas Gervasjo ĉi tie. Ni delonge ne revidas! Mi ĝojas, ke mi renkontis vin denove».

«Kaj ankaŭ mi, Gervasjo. Mi ĝojas, ke ni denove renkontiĝas».

«Kion vi scias pri via edzo?»

«Li ankoraŭ estas en malliberejo. Li diras, ke li estas senkulpa. Sed li havas tempon tie».

«Ni ne povas permesi tion. Mi provos paroli kun mia amiko kiu estas advokato, por vidi ĉu lia kazo povas esti solvita».

«Sed tio signifas monon. Kaj mi ne havas».

«Nu, mi havas kelkajn ŝparaĵojn».

Iom post iom ni prenis la konversacion al tiu punkto, kiun ni lasis ĝin antaŭ multaj monatoj, preskaŭ unu jaro. Neniu dirus, ke la antaŭan tagon tiu virino sin proponis al mi kaj ĝuis ŝin tiel perversa kaj abomena maniero. Sed en milito oni foje devas esti konfuzita kun la malamiko, se oni volas venki ĝin. Mia problemo, kaj nun ne malgranda, estis decidi ĉu mi devos forigi Brenda de la vojo, aŭ ĉu ŝi havas savon. Ĉar ŝia edzo klare ne havas. Li devus fali, eĉ se ĝi devus unue eligi lin el malliberejo.

«Nu, sed se via edzo ne kulpas..., kiu povus kulpi?»

«Nu, neniu ajn scias. Profesia mastrino konas multajn homojn. Eĉ politikistojn kaj homojn kun multe da mono. Eĉ unu el tiuj, kiuj sendas al ŝi dungomurdiston, kiu estis dungita de alia dungomurdisto...

«Aŭ eble ŝi estis mortigita pro

eraro».

«Eble».

«Kaj kial Tomaso estis arestata?»

«Li estis la lasta, kiu vidis ilin vivantaj. Li koncedis ke li estis kun Silvin' kaj Erika tiun tagon».

«Kaj sekve?»

«Ajna. Oni supozis, ke li havis motivon, la okazon, kaj ne povis pruvi, ke li ne estis tie dum la murdoj».

«Ĉu li ne estis kun vi?»

«Li efektive promenis, kaj neniu povis atesti, ke ili vidis lin».

«Sed vi povus diri, ke li estas hejme».

«Povus. Sed bona edzino supozeble mensogas por sia edzo. Vi scias: senkulpigo pro geedza lojaleco».

«Kiajn leĝojn ni havas! En serioza lando, via atesto valorus».

«Jes, sed ĉi tie ĝi validas nur se la juĝisto kredas min. Edzinoj estas kiel infanoj: ni povas diri la veron..., aŭ ne».

«Nu, mi scias, ke via edzo estas senkulpa».

«Do, vi scias pli ol mi, Gervasjo».

«Mi scias, tamen».

«Kaj kiel vi povas esti tiel certa?»

«Mi konas Tomason el tio, kion vi diris al mi kaj ĉar mi renkontis lin foje, kaj mi scias, ke li ne mortigus muŝon. Krome, mi ne povas imagi, ke li ligas Silvin'...»

«Ĉu vi konis lin?»

«Ne vere. Sed mi sekvis la juĝon tra la gazetoj. Ŝajne li ne havas sufiĉe fortan karakteron, kaj havas dolĉan emon. Mi ne pensas, ke la murdinto vera havas akran sintenon».

«Tio povas esti. Dum momento mi pensis, ke vi konas lin. Kvazaŭ nun vi ankaŭ estas dom...»

«Mi estas novulo pri tio. Kiel vi eniris ĉi tiun mondon?»

«Pro ĉagreno. Mi sentis min tre malbone pri ni, li kaj mi, kaj koni, kwe li estis ĉe la piedoj de alia virino igis min provi tion. Tial mi aliĝis al tiu de Sir Roĝero».

«Kiel vi renkontis lin?»

«Li estas amiko de Klara. Ni iris al privata sekstorturfesto kaj trovis lin».

«Ĉu vi estis lia unua subulino?»

«Mi estas».

«Nu, li ne estas tiel sperta, kiel

li diras. Laŭ tio, kion mi vidas, ĉi tie estas multe da malicaj lozoj».

«Sed li estas bona ulo».

«Jes kompreneble. Li diras, ke li forlasis vin ĉar vi ne havis klarajn ideojn».

«Nu, mi komencis iom pro ĉagreno, iom ĉar mi devis esti kun iu, kaj vi ne plu estis...»

«Li estis denove en la laboro. Certe, vi ne sciis kie mi loĝas... Nu, vi scias».

«Jes. Kaj ankaŭ Klara scias. Mi ne sciis, ke vi konas Klaran».

«Kaj mi ne konis ŝin».

«Nu, vin mankis al mi, Gervasjo».

«Mi estis ĉe la proceso de via edzo. En la lasta vico».

«Kaj mi embarasis rigardi malantaŭen. Kial vi nenion diris al mi?»

«Mi pensis, ke vi volas nenion fari kun mi. Vi ne vidis min de semajnoj».

«Certe. Sed vi estus subteninta min. Ĉiuj rigardis Tomason kiel monstron».

«Tomaso estas senkulpa».

«Kiel vi scias?»

«Li ne povas mortigi eĉ muŝon. Li ŝatas durn sekson, jen ĉio».

«Kaj kiel vi scias tion?»

«Mi scias tion».

«Ĉu persone?»

«Mi jam diris al vi, ke ni renkontiĝis unufoje sub via domo kaj ni komencis babili. Vi scias, ke mi sidas ie ajn por legi la ĵurnalon. Iufoje li estis tre nervoza ĉar lia buso malfruis kaj li laŭte plendis pri tio, kaj ni ekparolis».

«Ĉu vi sciis, ke li estas mia edzo?»

«Jes. Mi vidis ĝin la unuan tagon kiam mi kondukis vin hejmen. Mi legis la gazeton sur la benko ĉe la bushaltejo, kaj mi vidis vin akvumi la plantojn sur via balkono. Kiam li alvenis, mallonge antaŭ fini mian legadon, mi vidis, ke li eliris al la sama balkono kiel viaj plantoj».

«Ho, certe. Tial vi sciis kie li laboras kaj je kioma horo li foriras».

«Vi pravas. Mi sekvis lin dum kelkaj tagoj. Mi ne kaŭzus ĉi tiun situacion, se ne estus via pento».

«Kompatinda. Kaj vi ricevis la malon de tio, kion vi intencis».

«Jes, tiel estis. Sed he, jen ni denove estas en la sama loko, kie ni renkontis».

«Sed ne plu estas la sama. Nun mi estas via subulino. Subulino, kiu volas esti via sklavino».

Tio ŝokis min pli ol la du vangofrapoj kiujn Silvin' donis al mi. Mi rigardis ŝin kun murda vizaĝo, dum mi diris al ŝi el la fundo de mia animo:

«Ĉu vi sentas ĉi tion profunde interne?»

«Jes. Mi antaŭĝojas ĵeti min al viaj piedoj».

«Ĉi tio al vi finiĝos kiam mi tion diros».

«Mi scias, majstro».

"Nun mi estas Gervasjo."

«Pardonu, Gervasjo».

«Ĉu vi senvestiĝus ĉi tie, en ĉi tiu parko, kie estas tiom da homoj, se mi dirus al vi?»

Ŝia respondo estis forta: ŝi demetis sian sveteron kun ŝerco supren, restante en mamzono kaj jupo.

«Trankvila! Surmetu tion denove. Ĝi estis nur teoria demando».

«Jes, Gervasjo. Mi senhezite senvestus," ŝi diris, surmetante sian sveteron tiel rapide kiel ŝi demetis ĝin.

Lia sorto estis ĵetita: li ne povis savi sin de brulado. Mia Brenda ne plu estis mia. Ŝi estis same malbona kiel la aliaj. Doloris min vidi ŝin. Mi devus ekspedi ĝin. Tamen, ĝi ne estis tiel facila.

*Daŭrigota...*

Socialo

# Trompoj registaraj

Ŝajnas al mi mensoge tio, ke sunaj paneloj estas senpaga elektro. Tio ŝajnas al mi sama trompo kiel tiu pri la elektra aŭto: unue oni subvencias ĝin per ĉies mono, kaj poste, kiam oni forigas la subvencion, oni prirabas niajn poŝojn. La elektra aŭtomobilo estis konata antaŭ ili intencintis, ĉar ili estis tiel stultaj multekostigi la prezon de elektro ĝis neantaŭviditaj kosto, sugestante, ke ŝarĝi la baterion de la elektra aŭto, estonte, estos pli multekosta ol plenigi la benzinujon. Sunpaneloj, same kiel elektraj aŭtaj baterioj, estas malfacile recikleblaj —se oni eblos fari tion en la estonto—, kaj ili ankaŭ estas multekostaj kaj havas limigitan vivon. Alivorte, tiuj, kiuj vivas de ekologiismo, estas la plej malekologiemaj en la historio de la homaro. Kiam oni ekscios, ke ĉi tiu planedo ĉiam sciis prizorgi sin? Eĉ de la homa specio, kiu kompare ankoraŭ estas ĝena viruso por tiu ĉi rokego, por kiu ŝultrolevo sufiĉas por forigi kelkajn milojn da ekzempleroj per tremo da tero aŭ maro, tajdego, vulkanoj kaj similaj. Ni vivas en interglacia periodo, sed ĉar la viktimoj de la LOGSE jam atingis la parlamenton kaj la Registaron, ili eĉ ne scias pri tio.


Socialo

# Pri la neeeltenebla prezo de elektro en Hispanio

Vere ĉi tiu artikolo povus esti sinsekvo de la antaŭa. Nun ni havas la plej multekostan prezon de elektro de nia historio, kaj unu el la plej altaj, se ne la plej, el la mondo.

Tamen, ne mankas tiuj, kiuj diras, ke Pedro Sanĉes estas las plej progresisma prezidento de Hispanio... Bedaŭrinde, la lastaj eventoj en nia socio malverigas tiun aserton: li pligrandigis la dependecon de la aliaj du povoj, anstataŭ fari male, kio igus demokration pli granda kaj grava. Sed tion, kion li diris, kiam li estis kandidato, li ne faris.

Nun venas grava nova imposto sur nia elektra fakturo: oni bezonas gason por fari elektron —inter aliaj manieroj atingi tion—, kaj la Registaro de Hispanio, kontraŭante paktojn kun Eŭropo kaj Ameriko, ŝajnas, ke nun aĉetas gason de Rusio, ĉar Alĝerio ne plu volas vendi al ni tion. Sed la Registaro ne havas monon, ĉar ili elspezas ĝin en sensencaĵojn, kiel la Ministerio de Egaleco, kiun oni kreis por persekuti fantomojn, ĉar egalecon inter ĉiuj hispanoj garantias la konstitucio de 1978. Estas laboro de la Registaro igi ĉiun hispanon respekti tion. Bedaŭrinde, la sola rimedo por ke la registaro faru tion estas ampleksigi timon al karcero aŭ monpuno kaj al polico ĉe decaj civitanoj, ĉar la maldecaj havas neniun, kaj havos neniun timon al aŭtoritato, sengrave a al tio, kion la registaro faros. Ni ne forgesu, ke ni ĉiuj estis enkarcerigitaj kontraŭleĝe dum la pandemio dum kelkaj monatoj, malriĉigante nin ĉiujn, eĉ se la registaro ŝajnas ne suferi multe pri tio.



Dum la Prezidento petas sinoferojn al ni, li ade vojaĝas per aviadilo, helikoptero kaj luksaj aŭtoj, kvazaŭ li estus milionulo..., per mono nia, de la popolo de Hispanio. Nun la popolo finfine vidas, ke je sia fakturo de elektro, estas speciala nova imposto: *ekstremo gasa* **je €0.12 po Kw/h**, kio signifas, ke tre ofte **la kvanto pagenda duobliĝas!** Sed tiu nova

imposto pri ekstremo gaso estas **variebla ĉiutage**, kaj je la momento, kiam mi verkas ĉi tion, ĝi estas €0.37 po Kw/h! Kaj tio kvarobligas la bilancon...

Jes, popolo sinoferas, sed la registaro renoncas al neniu el siaj 22 ministerioj aŭ ties buĝetoj. Ĉu tiu estas ekzemplodona registaro?

| | |
|---|---|
| ENERGÍA | 170,29 € |
| CARGOS NORMATIVOS | 129,86 € |
| SERVICIOS Y OTROS CONCEPTOS | 4,17 € |
| IVA Reducido (*) | 15,05 € |
| IVA | 0,71 € |
| **TOTAL** | **320,08 €** |

**FECHA PREVISTA DE COBRO: 01/09/2022**

Eble oni povas pensi, ke mi troigas. Pro tio mi aldonas ĉi tie parton de fakturo de amiko, kiu devas pagi €129'86 pro tiu nova imposto, aldone al €15'05 de AVI (aldonValorImposto), tio estas, €144.91 pro tio, ke la registaro estas monavida.

Sed **tio ne povus okazi, se en Hispanio ekzistus vera demokratio**. Ĉar en demokratio, popolo regas, kaj se registaro agas kontraŭ la popolo, la popolo —tio estas, ties reprezentantoj— povas eksoficiigi al registaro tuj kaj senaverte. Kaj registaro, kiu scias tion, neniam mistraktas la popolon eĉ dekone al tio, kio la Registaro de Pedro Sánchez faras nun. Ĉi tiu fakte mortigas la kokinon de orovoj.

En demokratio, deputitoj ne reprezentas partiojn politikajn, sed la civitanojn, organizitajn po distriktoj. Deputitoj povas aparteni al tiu partio politika, kiun ili deziras, sed tio ne gravas al la civitanaro, al kiu gravas nur tio, kion la deputitoj faras. Kaj en demokratio, parlamento povas voĉdoni eksoficiigi la registaron pro kompreneblaj kialoj, ekzemple tiujn, kiujn faras la vivo de civitanoj neeblaj, same kiel okazas nun en Hispanio. Se Parlamento ne pravas, juĝistoj povas juĝi tion... Sed tio ne okazas nun en Hispanio:

Kaj juĝistoj kaj parlamento dependas nun de la volo de la Prezidento, kaj sekve demokratio ne ekzistas. Kio ekzistas nun en Hispanio? **Diktatoreco**, ĉar l**a tuta povo restas en povo de ununura persono**, kiu faras leĝojn senlimigite, eĉ tio ne estas lia laboro, ĉar tio estas la laboro de Parlamento. La laboro de la Prezidento de la Registaro estas garantii, ke ĉiuj plenumas la leĝon. Malfacila tasko, se la Registaro mem ne plenumas tion. Hispanio ne meritas registaron, kiu rabas nin kaj mensogas al ni. Ni vekiĝu!

Literaturo

# Defendo de Hispaneco

*Ramiro de Maeztu*

## Hispaneco kaj ties disdivido: Apartigo de Ameriko kaj Unueco de Hispaneco

*La 12-an de oktobro, mistitolita* ***la Tago de la Raso****, devus de nun esti la Tago de* ***Hispana Heredaĵo***. Per ĉi tiuj vortoj, la 12an de oktobro estris sian specialaĵon modesta semajna gazeto el Bonaero ***El Eco de España*** (La eĥo de Hispanio). La vorto ŝuldiĝas al hispana pastro kaj patrioto kiu loĝas en Argentino, D. Zacarías de Vizcarra. Se la koncepto de kristanismo inkluzivas kaj samtempe karakterizas ĉiujn kristanajn popolojn, kial oni ne elpensu alian vorton, kiel **Hispanidad** (Hispaneco) kiu ankaŭ inkluzivas kaj karakterizas ĉiujn hispanajn popolojn?

**Unua demando**: Ĉu Portugalio kaj Brazilo estos inkluzivitaj en ĝi? Kelkfoje la portugaloj protestas. Mi ne pensas la plej klera. Cámoens nomas ilin (***Os Lusiadas***, Canto I, strf. XXXI): *Huma gente fortissima de Espanha* (Tre forta popolo el Hispanio).

André de Resende, la humanisto, diris same, per vortoj laŭdataj de Carolina Michaaëlis de Vasconcelos: *Hispani omnes sumus*. Almeida Garret ankaŭ diris ĝin: *Ni estas hispanoj, kaj ni devas nomi hispanoj ĉiujn, kiujn da ni loĝas en la hispana duoninsulo.* Kaj Don Ricardo Jorge diris: *Chamese Hispania à peninsula, hispano ao seu habitante ondequer que demore, hispánico ao que lhez diez respeito* (Nomu la duoninsulon **Hispania**, **hispano** sian loĝanton, kie ajn naskiĝinta, kiel rajto). Hispanoj estas do ĉiuj popoloj, kiuj ŝuldas sian civilizacion aŭ estaĵon al la popoloj hispanaj de la duoninsulo. **Hispaneco** estas ideo, kiu ampleksas ilin ĉiujn.

Ni vidu, kiagrade ĝi karakterizas ilin. Hispaneco,, kompreneble, ne estas raso. ***El Eco de España*** prave diris, ke la nomo de *Tago de la Raso* estas miselektita la 12an de oktobro. Oni povus akcepti nur en la senco pruvi, ke ni hispanoj ne donas gravecon al sango aŭ haŭtkoloro, ĉar tio, kion ni nomas *raso*, ne konsistas el tiuj trajtoj, kiuj povas esti transdonitaj per protoplasmaj obskuraĵoj, sed per tiuj aliaj, kiuj estas lumo de la spirito, kiel parolo kaj kredo. Hispaneco konsistas el homoj de rasoj blanka, nigra, hinda kaj malaja, kaj ties kombinaĵoj, kaj estus absurde serĉi iliajn trajtojn per la

metodoj de etnografio.

Ankaŭ per tiuj de geografio. Ĝi estus perdiĝi antaŭ ol ekmarŝi. Hispanoj ne loĝas en unu lando, sed en multaj kaj tre diversaj. La varieco de la duoninsula teritorio, malgraŭ esti tiom granda, estas unueco kompare kun tiu loĝata de la hispanaj popoloj. Magaljano, en la Sudo de Ĉilio, pensigas pri la Nordo de Skandinavio. Iom pli norde, sude de Argentina Patagonio, regas siberia klimato. La homoj, kiujn produktas tiuj landoj, ne povas simili tiun el Guayaquil, Veracruz aŭ Antiloj, nek ĉi tiun el la andaj altaj teroj, nek ĉi tiun el la paragvajaj aŭ brazilaj ĝangaloj. La klimatoj de Hispaneco estas tiuj de la tuta mondo. Kaj ĉi tiu manko de geografiaj kaj etnografiaj trajtoj estas ankoraŭ unu el la plej decidaj trajtoj de Hispaneco. Almenaŭ oni eblas aserti, kompreneble, ke Hispaneco ne estas natura produkto, kaj ke ĝia spirito ne estas tiu de tero, nek tiu de determinita raso.

Ĉu estas do la Historio tiu, kiu ĝin difinas? Ĉiuj popoloj de Hispaneco estis regitaj de la samaj Monarĥoj de 1580, la jaro de la aneksado de Portugalio, ĝis 1640, la dato de ties apartiĝo, kaj antaŭ kaj poste de la du duoninsulaj monarĥioj, de la jaroj de la malkovroj ĝis la apartigo de la popoloj de Ameriko. Ili ĉiuj ŝuldas sian civilizacion al Hispanio kaj Portugalio. Civilizo ne estas aventuro. Mi volas diri, ke la komunumo de hispanaj popoloj ne povas esti tiu de vojaĝantoj sur ŝipo, kiuj, kunloĝante kelkajn tagojn, adiaŭas por neniam revidi sin. Kaj ne estas, fakte. Ĉiuj ili konservas senton de unueco, kiu ne konsistas nur el paroli la saman lingvon aŭ en la komunumo de historia deveno, nek ĝi estas adekvate esprimita dirante, ke ĝi estas solidareca, ĉar per solidareco la Akademia vortaro komprenas cirkonstancan aliĝon al la afero de aliaj, kaj ĉi tie ne temas pri cirkonstanca aliĝo, sed pri konstanta komunumo.

***

Ni ne troigu tamen la mezuron de la unuo. Sed estas fakto, ke ambasadoro de Hispanio ne sentas sin tiel strange en Bonaero kiel en Rio-Ĵanejro, nek en Rio-Ĵanejro kiel en Londono, nek en Londono kiel en Tokio. Estas ankaŭ fakto, ke taĉmento de nordamerika mara infanterio ne povos surteriĝi en Nikaragvo sen damaĝi la patriotismon de Argentinio kaj Peruo, Meksiko kaj Hispanio, kaj eĉ tiun de Brazilo kaj Portugalio. Ne nur ĉi tio. Sufiĉas la nura deziro de usona politikisto s-ro William G. McAdoo, ke Britio kaj Fran-

cio transdonu al Usono, por la pago de siaj militaj ŝuldoj, siajn havaĵojn en Okcidenta Indioj kaj Angla kaj Franca Gujano, ke gazeto tiel saturita de argentina patriotismo kiel ***La Prensa***, de Bonaero, kiu proklamas (la 18an de novembro 1931), ke *ĉiuj hispan-amerikaj popoloj pledas por la sendependeco de Porto-Riko, la retiro de la trupoj el Nikaragvo kaj Haitio, la reformo de la Platt-amendo kaj la nescio, kiel doktrino, de la Monroe-deklaro.*

Aliflanke, estus multaj kialoj por dubi, ke ĉi tiu unuo, kiun ni nomas hispana, estas tre solida. Unue, ĉar mankas al ĝi jura korpo, kiu povas aserti ĝin efike. Ironiulo nomis la Hispan-Amerikajn Respublikojn *La Disunuiĝintaj Ŝtatoj de la Sudo*, kontraste al la Unuiĝintaj Ŝtatoj de la Nordo, Usono. Sed pli grava ol la manko de la organo estas la konstanta kritiko kaj neado de la du historiaj fontoj de la komunumo de hispanaj popoloj, nome: la katolika religio kaj la reĝimo de la Hispana Katolika Monarĥio. Oni povus diri, ke tiu duobla rifuzo estas samsubstanca kun la ekzisto mem de la latinamerikaj respublikoj, kiuj forĝis siajn naciecojn je la lukto kontraŭ la hispana superregado. Sed ĉi tiu interpreto estas tro simpla. Nacioj ne estas formitaj en negativa maniero, sed pozitive kaj per asocio de la spirito de siaj loĝantoj al la tero kie ili vivas kaj mortas. Estas pura hazardo, ke, kiam la hispanaj naciecoj de Ameriko formiĝis, la ideoj de la Franca Revolucio regis en la mondo. Ili hazarde venkis kaj venkis dum la lasta jarcento. Jam el ili eliras la plej bonaj spiritoj, tiel seniluziigintaj kiel Simón Bolívar, kiam li diris: *Tiuj el ni, kiuj laboris por la revolucio, plugis en la maron.*

Nun ili estas perpleksaj. La plej perceptaj jam perdis la fidon, kiun ili havis al la doktrinoj de la revolucio. En ĝia nuna krizo, ne restos multaj talentoj, kiuj povas certigi, kiel Carlos Pellegrini antaŭ tri kvaronjarcentoj, ke *la progreso de la Argentina Respubliko estas deviga kaj fatala fakto*. La fatalo de la progreso estas unu el la iluzioj, kiujn la granda milito forĵetis. Ĉiuj hispan-amerikaj geniuloj ne havas la malĝentilan sincerecon, kun kiu la ĉilia Edwards Bello proklamis, ke: *Al la iberamerika arto, sen radikoj en naciaj kategorioj, mankas intereso pri Eŭropo.* Sed multaj sentas, ke aferoj ne iras kiel ili devas, des malpli kiel iam atendite. Ekonomie, tiuj landoj, kiuj vivas de tago al tago, dependas de la grandaj pruntedonantaj nacioj, antaŭe, de Anglio, nun, de Usono. Ili nek estas popoloj de inventistoj, nek de grandaj entreprenistoj.

Ankaŭ ĝiaj esploristoj estas malabundaj. Ili suferas, pligravigitaj, la malsanoj de Hispanio. Edwards Bello atribuas ĝin al tio, ke ili estas dividitaj en tiom da naciecoj. Tio, kio faris Salvadoron Bolivaron kaj Rubenon Darion grandaj, laŭ lia opinio, estis povi esti, en difinita momento, la soldato kaj la poeto de tuta kontinento. Fakto estas, ke hispanaj popoloj vivas de tago al tago, sen idealo, almenaŭ sen idealo, kiun la tuta mondo devas danki al ili. Kaj ĉu la nesufiĉa solidareco de la hispanaj popoloj ne dependos de tio, ke ili permesis, ke siaj komunaj historiaj valoroj velkas kaj forvelkis? Kaj ĉu tio ne ankaŭ estas la kaŭzo de la manko de originaleco? Ĉu originalo ne estas denaska?



Ramiro de Maeztu

# Kajeroj el la Sudo

Bulteno de Hispana Asocio
de Laboristoj Esperantistaj

http://www.gazetoteko.com/hale/kels124.pdf

Numero 124- Julion 2022




ISSN 1886-1938 (printita)
ISSN 1886-1997
Depósito legal: Z-2398-88